

LA PONTO

Tweemaandelijks tijdschrift van de Limburgse Esperantovereniging.



Jaargang 5, nummer 5 (29) januari-februari 2013
Verschijnt op de eerste dag van iedere onpare maand.

Erkenningsnummer: P808228

V.U.: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81, B-3940 Hechtel-Eksel

Tel. 011-73.20.47 – E-mail: pieter-jan.doumen@telenet.be

LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)

Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.

Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato
Jarkolekto 5, n-ro 5 (29): januaro-februaro 2013
Ĉiuj antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas ĉe [http://
esperanto-forum.net/doc/LaPonto/archief.html](http://esperanto-forum.net/doc/LaPonto/archief.html) .

Ĉiu rajtas plu sendi aŭ kopii la revuon.

Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47

Retadreso: pieter-jan.doumen@telenet.be

Redaktore...

Karaj Gelegantoj,

La ekonomia kaj financa krizo en Eŭropo daŭras. Nia tuta sistemo malsanas : klare ne eblas daŭrigi la nunan prizorgantan ŝtaton. La ŝtatoj havas enormajn ŝuldojn, dum multaj homoj estas riĉaj. Strukturaj reformoj estas necesaj, sed la politikistoj ne kuraĝas reformi, timante perdi siajn adeptojn .En Eŭropo ankaŭ esperantismo ŝajnas esti en krizo, sed ĝi estas de tute alia naturo. Ĝi suferas precipe pro la malinteresiĝo de la plimulto de la homoj, ĉefe de la gejunuloj, kiuj serĉas nur amuzon.Ĉiuj organizaĵoj suferas pro tiu fenomeno.

Tamen ne estas la unua krizo. La du mond-militoj preskaŭ neniigis esperantismon dufoje, sed ĝi ĉiufoje revenis plifortigita. La historio neniam evoluas kiel futurologoj antaŭdiras ĝin. Tiu senlima evoluo al ĉiam pli da lukso kaj komforteco nun ŝajnas esti finiĝonta. Sed ankaŭ tiu ĉi krizo pasos. Tial ni devas unuigi niajn fortojn, adapti nin al la novaj cirkonstancoj, kiujn tiu krizo kreas, ne perdi kuraĝon, pacienci, esperi kaj persisti.

Tio estas mia deziro por ĉiuj gelegantoj komence de tiu ĉi nova jaro!

Pieter Jan Doumen

Historio de Esperanto (2)


(Geschiedenis van het Esperanto) (2)

2. Periodo de la unuaj kongresoj

En Rusujo¹ Esperanto ekhavis siajn unuajn adeptojn. Tre baldaŭ fondiĝis kluboj en la plej diversaj lokoj. La ruslandaj esperantistoj multe verkis en la lingvo kaj kreskigis la komecan literaturon. Plej grava inter ili estis la pola kuracisto kaj poeto Antoni Grabowski, la unua persono kun kiu Zamenhof parolis en Espe-

ranto kaj kiu tradukis, laŭ peto de Zamenhof, en rimantaj versoj la nacian polan epopeon 'Sinjoro Tadeo', verkita de Adam Mickiewicz.

En 1879 la germano J. M. Schleyer eldonis sian artefaritan lingvon Volapük, kiu havis komence relativan sukceson. Fervora volapükisto en Nurenberg (Germanio), Leopold Einstein, studinte esperantan lernolibron, tuj transiris al Esperanto, kaj kun li la tuta nurnberga volapükista klubo. Ĝia prezidanto, Chr. Schmidt, en 1889 komencis eldoni la unuan esperantan gazeton, 'La Esperantisto', kiu fariĝis la plej grava ligilo inter la esperantistoj.



Al ĉiuj niaj gelegantoj kaj iliaj familioj ni deziras prosperan kaj feliĉan novan jaron 2013!

Post unu jaro Zamenhof transprenis la gazeton, sed li havis gravajn ekonomiajn malfacilaĵojn, kaj nur per la mona subteno de S-ro Trompeter de Schalke (Vestfalio) la gazeto saviĝis. En 1895 aperis en ĝi traduko de tre laŭda artikolo pri Esperanto de Leo Tolstoj, kaj tial la rusa cenzuro malpermesis la gazeton en Rusujo, kie ĝi havis tri kvaronojn de siaj abonantoj. Pro tio la gazeto devis ĉesi, kaj la esperantistoj mal-longe perdis sian interligilon.

Sed ankaŭ en Svedujo jam kreskis intereso por Esperanto, kaj en la sama jaro 1895 la

¹ Al kiu apartenis Pollando.

Esperantista Klubo de Uppsala komencis eldoni novan esperantan gazeton 'Lingvo Internacia'. Unu el la plej konataj svedaj esperantistoj de tiu tempo estas ĝia redaktoro Paul Nylén.

Ankaŭ en Fancujo baldaŭ vekiĝis granda intereso por Esperanto. La unua franca esperantisto estis markizo Louis de Beaufront, kiu dum multaj jaroj estis tre aktiva propagandisto, verkis lernolibrojn kaj la unuan pli grandan gramatikon, kaj fondis la Societon Francan por la Propagando de Esperanto. Lia influo en la komenca tempo estis tre granda. Baldaŭ vekiĝis por Esperanto ankaŭ diversaj universitataj profesoroj kaj aliaj sciencistoj, kiel rektoro Emile Boirac, profesoro Carlo Bourlet, profesoro Théophile Cart, d-ro Emile Javal kaj aliaj. Profesoro Bourlet sukcesis interesigi la gravan francan societon 'Touring Club'.


Iom post iom aperis esperantistoj ankaŭ en aliaj landoj, kaj fondiĝis Esperanto-klubo en multaj lokoj.

Antaŭ la jaro 1905-a esperantistoj malofte havis okazon paroli la lingvon kun alilandanoj. Esperanto estis ĉefe parolata inter samlandanoj por instrua celo. Estas klare, ke tia stato kaŝis en si la danĝeron de dialektiĝo. Kongresoj grandnombre vizitataj, amasaj interrenkontiĝoj de diverslingvaj esperantistoj efikas sanige. Pluraj devioj en prononco kaj akcento jam apartenas al la historio sekve de reciproka korekto. Sed ne nur por buŝa kontakto valoras kongresoj. Grava estas ankaŭ ilia propaganda efiko. Aliflanke kongresoj donas al la esperantistaro okazon diskuti siajn problemojn kaj komunajn interesojn.

Nur en 1903 en Havro kaj en 1904 en Kalezo kaj Dovero okazis malgrandaj kunvenoj, en kiuj partoprenis ĉefe francoj kaj angloj; sed tiuj kunvenoj brile sukcesis, kaj en 1905 oni aranĝis la unuan Universalan Kongreson en Bulogno-ĉe-Mar (Boulogne-sur-Mer). Post tiu tempo ĉiusomere okazis Universalaj Kongresoj, escepte dum la militoj.

Dum la unua kongreso, kiun partoprenis 700 personoj, oni elektis provizoran Lingvan Komitaton, kiu estis definitive aprobita de la dua kongreso en Ĝenevo, Svisujo. La unua kongreso akceptis ankaŭ la tiel nomatan "Bulonjan Deklaracion" kiu precizigas la absolutan neŭtralecon de "Esperantismo" kaj difinas, ke la "Fundamento de Esperanto" estas la sola deviga bazo de la lingvo.

Dum la dua kongreso estis starigita la Konstanta Komitato de la Kongresoj (K.K.K.), kiu ĝis 1924 faris la ĝeneralajn preparojn por la



kongresoj, dum la Loka Kongresa Komitato (L.K.K.) faris la lokajn aranĝojn kaj preparojn. De 1924 la Internacia Centra Komitato transprenis la aranĝon de la kongresoj, poste la Universala Esperanto-Asocio, kaj fine la Internacia Esperanto-Ligo faris tion.

La kongreso en Krakovo en 1912 festis la 25-jaran jubileon de Esperanto. Dum tiu kongreso D-ro Zamenhof demetis sian rolon kiel gvidanto de la Esperanto-movado, kaj deziris poste esti nur simpla esperantisto.

En ĉi tiu tempo Esperanto pli kaj pli disvastiĝis, ankaŭ ekster Eŭropo: en Azio (Japanujo, Ĉinujo) kaj Ameriko (Usono, Brazilo), kaj en 1940 la kongreso okazis eĉ en Vaŝingtono. En la deka kongreso en Parizo en 1914 volis partopreni preskaŭ 4000 personoj, sed ĝuste antaŭ ĝia malfermo la unua mondmilito eksplodis, kaj la kongresanoj, inkluzive de D-ro Zamenhof, devis tuj revojaĝi hejmen.

Dum la milito kontakto inter la diverslandaj esperantistoj estis tre malofta, sed la Universalaj Esperanto-Asocio (U.E.A.), sidante en Svisujo, faris valoran helpon al militkaptitoj kaj aliaj personoj, prizorgante la transsendadon de leteroj. En 1915 okazis en San Francisko la 11-a kongreso anstataŭ amerika kongreso. Partoprenis nur kelkaj centoj, precipe Amerikanoj.

En 1919 la K.K.K. kunvenis en Parizo por refunkciigi la kongresojn, kaj en 1920 okazis la 12-a kongreso en Hago kun 4000 partoprenantoj. Baldaŭ la kongresoj denove estis grandaj: al la 15-a en Nurnbergo en 1923 aliĝis preskaŭ 5000 personoj, sed pro politikaj malfacilaĵoj partoprenis en Vieno nur proksimume 4000. Pro la sama kaŭzo la kongreso en Vieno en 1924 havis grandan deficiton, kiu nur post 6 jaroj estis forigitaj per monkoklektoj inter la esperantistoj.

En 1929, tuj antaŭ la kongreso en Budapeŝto, la aŭstra ŝtatprezidento Miklas solene malfermis la Internacian Esperanto-Muzeon en Vieno. La kongreso en Varsovio en 1937 festis la 50-jaran jubileon de Esperanto.

Ankaŭ dum la dua mondmilito la kontakto inter la esperantistoj estis malofta, kaj la Internacia Ligo de Esperanto sidis en militanta lando, Anglujo. Sed en 1947 la unua postmilita kongreso okazis en Berno kun proksimume 1400 partoprenantoj.

Dum la kongresoj okazas fakaj kunsidoj, kie oni povas diskuti fakajn aferojn kun alilandaj samfakuloj. Okazas ankaŭ diservoj kaj ekskursoj, kaj teatraĵoj estas prezentataj. Sed la ĉefa temo de la plej multaj kongresoj de 1900 ĝis 1937 estis la problemo de la organizado de la Esperanto-movado.

Ĉiam pli multaj registaroj sendas al la kongresoj oficialajn reprezentantojn. De 1925 dum la kongresoj estas aranĝataj t.n. Someraj Universitatoj, t.e. serio da paroladoj pri diversaj sciencaj aŭ aliaj temoj, farataj de diverslandaj fakuloj. La kongresoj estas brilaj manifestacioj de la Esperanto-movado, kiuj ankaŭ donas al la diverslandaj esperantistoj okazon persone interkonatiĝi kaj uzi la lingvon, kaj pli ol io alia montras la perfektan uzeblecon de Esperanto.

Laŭ Stöp-Bowitz kaj Isbrücker

Novajoj en Esperantolando

(Nieuws uit Esperantoland)

Francio – *Martorelli ricevis premion FAME* –


En 1988 Alois Meiners starigis la fondaĵon FAME por subteni la esperantan kulturon, enkadre de kiu ĝi aljuĝas la Kulturpremion FAME kun aldonita sumo de 3000 eŭroj – la plej alta premisumo en la esperanta mondo. La ĉi-jaran premion ricevis Floréal Martorelli pro siaj meritoj rilate al la esperanta muzika kulturo. La transdona ceremonio okazis en la urbo Aalen en la kadro de solena festo kun subteno de la urba administracio. La festprelegon eldiris la konata germana esperantisto Gunnar Fischer.

Sincerajn gratulojn al Floréal Martorelli, kaj al la tuta teamo de la Esperanto-eldonejo Vinilkosmo pro la premio! (Szilvási László)

(Ret-Info, Eventoj, Hungario)

Pollando – *Ponto Esperanto en Bydgoszcz* –

Okaze de la 125-a datreveno de Esperanto la urba konsilio de Bydgoszcz (Bidgoŝc) decidis



honorigi tiun gravan jubileon per donado de la nomo 'Most Esperanto' al la ponto konstruita trans la rivero Brda. La 27-an de oktobro 2012 okazis la oficiala malkovro de du tabuloj kun la surskribo 'Most Esperanto' en ambaŭ flankoj de la ponto. La ceremonion gvidis en Esperanto kaj en la pola lingvo Lech Zagloba, prezidanto de la Urba Komisiono pri Kulturo kaj Edukado, ĉar li mem estas esperantisto ekde pli ol 40 jaroj. La ceremonion partoprenis kelkdek personoj el Pollando kaj gastoj el Germanio, Kazahio, Rusio kaj Senegalio, kaj raportis pri ĝi ankaŭ la urba televido. (Laŭ Andrzej Grzębow-ski, Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo.)

Ret-Info, Eventoj, Hungario

Belgio – *Alvoko al la legantoj de La Ponto* –

Ni estas farantaj elektronikan Esperanto-vortaron tute en Esperanto kun la titolo 'Kompleta Vortaro kun Ilustraĵoj'. Tiu vortaro konsistas el du partoj : parto kun la kapvortoj kaj alfabetaj partoj. En ambaŭ kazoj oni povas serĉi en la vortlisto kaj ankaŭ ene de la tekstoj mem. Ĉiu vorto estas provizita de vinjeto, sur kiu oni povas serĉi. La vortaro enhavas ĉiujn landojn de la mondo kun ĉefurbo, subdivido, provincoj, arondismentoj ktp. kun mapeto. Ĉiuj ĝis nun konataj ĥemiaj elementoj estas enmetitaj, same kiel amaso da novaj plantoj kaj floroj kun eventuala foto aŭ desegnaĵo. Ĝis la litero i estis jam aldonitaj 1.500 novaj vortoj aŭ derivaĵoj. La nombro de la figuroj sumas ĉirkaŭ 3000. Vortaro kaj figuroj kune okupas 150 MB.

Ĉar nun la Plena Ilustrita Vortaro troviĝas en la interreto, ni uzas ĝin kiel bazon kune kun nia vortaro Esperanto-Nederlands-Esperanto. El PIV ni ellasis la superfluan balaston, tiel ke

lingvisto ankoraŭ ĉiam devas uzi la presitan version de PIV. Ĉar la traduko de la nederlandaj klarigoj de vortoj al Esperanto postulas multan tempon, mi alvokas vin por helpi nin. Se vi ŝatus kunlabori kaj se via kono de Esperanto estas pli ol bona, sendu al mi mesaĝeton. Kun antaŭa danko, Erik D'Hondt. Retadreso: eriko@telenet.be.

Nederlando – *Poŝtmarko pri la Unua Libro* –

Por omaĝi la 125-an datrevenon de Esperanto, UEA jam duafoje mendis ĉe la nederlanda kompanio PostNL porokazan poŝtmarkon. En aprilo aperis poŝtmarko kun la simbolo de la jubilea jaro. La nova poŝtmarko montras la kovrilon de la Unua Libro, kun la nederlanda teksto "Eerste leerboek (t.e. Unua lernolibro) Esperanto 1887-2012". Ĝi validas por afranki normalan unuaklasan enlandan leteron. Sur ĝi troviĝas foto de la kovrilo de la libro.

La poŝtmarko pri la Unua Libro jam estas la sesa mendo de UEA. La antaŭaj markoj ricevis multe da publikeco en la nederlandaj filatelaj revuoj, kaj la nova marko certe spertos la samon. La temoj de la du unuaj markoj, aperintaj en 2008, estis la 93-an UK en Roterdamo kaj la 100-a datreveno de la fondo de UEA. Ili ambaŭ estas jam elĉerpitaj, sed plu haveblas la poŝtmarkoj pri la 150-a naskiĝdatreveno de Zamenhof kaj la 100-a de Ivo Lapenna, eldonitaj en 2009. Ankaŭ ili estis vendataj en blokoj de 10 markoj (€ 5,50 por bloko), same kiel la supre menciita poŝtmarko kun la jubilea simbolo (€ 6.00 por bloko). Ili mendeblas ĉe <http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf>, sed aldonu al tio sen spaco por la poŝtmarko de L.L. Zamenhof : =7376, por tiu de Lapenna: =2769, por tiu de Esperanto 125: =8804, kaj por tiu de la Unua Libro : =8884.

Ret-Info, Eventoj, Hungario

Argentino – *Ĉiutagaj novaĵoj mallonge* –

Kiuj estas la ĉefaj novaĵoj hodiaŭ el la tuta mondo? Al tiu demando respondas Maximiliano Catania el Argentino, redaktoro de novtipa jutuba novaĵservo. Jam de pluraj monatoj li ĉiutage resumas en Esperanto la plej gravajn novaĵojn en 90-minuta aŭdvida kompilaĵo per jutuba filmeto: oni vidas frapfilmeton (kiel sur televidilo), aŭdas ĝin (kiel per radio) kaj sub la bildoj oni povas ankaŭ legi la voĉlegitajn tekstojn, kio povas helpi la komencantojn. Tiuj aŭdvidaj novaĵoj estas spekteblaj en la propra kanalo de Youtube ĉe <http://www.youtube.com/mxcatania/feed?filter=2>.

Maximiliano produktis jam pli ol 100 novaĵ-registraĵojn, kiujn oni povas spekti laŭ diversaj enhavkategorioj: Esperanto-novaĵoj, novaĵoj por Muzaiko, novaĵoj por BBC, ktp. La kompi-laĵoj estas aŭdvideblaj, ne nur en la jutuba kanalo, sed ankaŭ en la novaĵportalo de RTE ĉe <http://novajhoj.weebly.com/> kaj ankaŭ en Muzaiko.

(Ret-Info, Eventoj, Hungario)

Hungario – *Avo Frosto parolas Esperanton* –

Avo Frosto vizitis la infanojn en Hungario la 6-an de decembro. Unu semajnon antaŭe mia 4-jara filino estis "superstelo" en la infanĝardeno, kiam ŝi portis kaj fiere montradis la perpoŝte ricevitan leteron de Avo Frosto... Sekvajare ni skribos al Avo Frosto en Esperanto. Ni sukcesis ekscii lian poŝtan adreson.

Avo Frosto havas plurajn nomojn, kiel ekz. Patro Kristnasko, Jul-Avo, Sankta Nikolao, Kristnaska Viro. Ĉe la jarfino li portadas donacojn al infanoj, sed antaŭ dek jaroj li lernis Esperanton ĉe la Esperanto-Societo Kebekia!

Avo Frosto loĝas ĉe la Norda Poluso en Kanado. Kun ĝojo li ricevas manskribitajn leterojn de infanoj kaj junuloj, kaj li volonte respondas al ili en vera paperkovertita letero en Esperanto! Tio certe ĝojigas ne nur la infanojn de esperantlingvaj familioj, sed ankaŭ tiujn, kiuj lernas la lingvon en infanĝardenoj, lernejoj aŭ en libertempo.

Avo Frosti tre ŝatas, ke la infanoj aldonu al sia letero desegnaĵon aŭ kelkajn manskribitajn vortojn, eĉ se ĉe tio helpas al ili la gepatroj! Por certigi la ĝustan pritraktadon sur via koverto kaj letero aperu la vorto 'Esperanto'! Viajn leterojn direktu al: Avo Frosto, Norda Poluso, Hoh Oko, Kanado, Canada.

Ret-Info, Eventoj, Hungario



Recenzo: Karlo kaj Elegasto

(*Recensie: Karel ende Elegast*)

Vraie historie ende waer,

Mach ic u tellen: hoorter naer!

Kiu en Nederlando kaj Flandrujo neniam aŭdis ĉi tiujn vortojn? Estas la malferma frazo de la mezepoka kavalirromano Karlo kaj Elegasto. Danke al Pieter-Jan Doumen nun ĉiuj en la mondo povas ĝui la rakonton – kondiĉe ke oni komprenas Esperanton. Jen nova motivo por lerni la internacian lingvon.



La mallonga romano, bazita sur vera incidento, temas pri konspiro kontraŭ Karlo (= Karlo la Granda). Iun nokton anĝelo de la ĉielo avertas la regnestron Karlo, ke li certe perdos sian vivon se li ne ekiros ŝteli. Nur post la tria anĝela alvoko la reĝo kredas, ke la mesaĝo vere venas de Dio, kaj konsekvenca li obeas, kvankam malvolonte pro la fakto ke ŝteli oponas lian propran leĝon.

Al ĉiuj kiuj forgesis la sekvaĵon kaj finon de ĉi tiu streĉa kaj de tempo al tempo humura rakonto, mi konsilas mem legi la libron. Sed ankaŭ por ĉiuj kiuj ankoraŭ memoras la rezulton de la nokta reĝa obeo, estos plezure legi la allogan tradukon de Pieter-Jan Doumen. Fakte por nederlandlingva esperantisto lia traduko verŝajne estas pli facile legebla ol la meznederlanda originalo – aŭ, laŭ la tradukisto, la "flandralingva".

Doumen lertege faris tradukelektojn. Unuflanke la malnova tradukita teksto aspektas moderna, ĉar mezepoka esperanto klare ne ekzistas; aliflanke Doumen prave konservis la versformon, kaj eĉ plibonigas ĝin, kio donas al la teksto ĝian aŭtentikecon. La originala por

faciliĝo regule murmuregas pri la metro kaj ritmo, tamen la traduko estas admirinde konsekvenca pri la uzado de troĥeoj en versoj de po ok silabloj. La bonkvalito de la traduko precipe montriĝas kiam oni – same kiel kutimis dum la mezepoko! – laŭtlege ĝin: tiam oni malkovros ke la rigida konsekvenca versfarado belsonas vigle nek artefarite nek devigite. Estas impona streĉfaritaĵo por teksto de pli ol 1400 versoj. Rilate al tio la libera vortsinsekvo de Esperanto kompreneble ne malhelpis. Voĉlegu – kaj aŭdu – ekzemple:

*Lian belan jungularon,
tute ore borderitan,
ankaŭ volas mi forpreni.
Multaj oraj tintiletoj
daŭre plaĉe tintetadas,
kiam li la bridon tenas.*

Sendube la decido ne transpreni la rimon en la traduko (ho! ho!) kontribuas al la eŭfonio. Ofte la versfinoj estas naturaj, malgraŭ la fakto ke ĉiu verso havas ok silablojn. Nur kelkfoje la traduko montras iu mallertaĵeton, ekzemple:

*Diru al mi, kavaliro,
kiel vi nomiĝas, por ke
mi la nomon konu de la
forta batalanto, kiu
venkis min, la kavalir' al
kiu mi honoron ŝuldas,
kaj min diru, kien vi nun
rajdas, aŭ pro kio fuĝas.*

Estas konata fenomeno en poezio kaj kantoj ke verkistoj inklinas trovi la apostrofon por solvi ritmo- kaj metrikoproblemojn. Kvankam la uzado de l'apostrofo fakte ne estas malkorekta, oni tamen, spertas ĝin kiel malforteco. Ĝenerale Doumen efektive sciis kaj eviti kaj apliki la "apostrofan teĥnikon". Esprimo kiel "l'ordono de l'anĝelo", "diablo el l'inferno", "l'edzin' de Egeriko", "li ĵuris ĉe l'ĉielo" kaj "kavalirojn de l'kortego" kontentigas pli ol langrompiloj kiel "murdi l'reĝon" kaj "por l'honoro" (neforĝesu prononci la "h"...).

Karlo kaj Elegasto estas taŭgega "ilo" por grupoj kiuj volas praktiki ĝui Esperanton. Pro ĝia mallongeco, relative simpla lingvo kaj enhavo oni facile povas laŭtlege ĝin kune, prefere post hejmpreparado. Depende de la rondo voĉlegi Karlo kaj Elegasto daŭras inter unu kaj du horoj. La kavalirromano havas diversajn rolojn, kiujn oni povus dividi inter la ĉeestantoj: la rakontanto, la anĝelo, Karlo, Elegasto (iliaj paroladoj kaj/aŭ pensadoj), Egeriko kaj lia edzino. Kvankam la anonima aŭtoro rimarkas ke la lasta "faligis cent

demandojn (tiaj estas la virinoj)”, ŝia rolo estas limigita al nur dek unu versoj! (Bonvolu atenti ke en la eldono oni neintence ellasis citilojn en kvar paĝoj : 24, 28, 31 kaj 38.) Al ĉiuj kiuj planas organizi tian mezepokan kunvenon : ne forgesu inviti blindajn esperantisojn por kunĝui kiel aŭskultantoj. Multan sukceson !

Marulino Hemelaar

Karlo kaj Elegasto. *Mezepoka nederlanda kavalirromano. Tradukis Pieter-Jan Doumen. VoKo-serio n-ro 27, Zwolle, 2012. 65 paĝoj. Prezo: € 9,00. Aĉetebla en la Libroservo de UEA.*

Nia rakonto : Flugemaj Ŝtonoj

(Ons verhaal: Vliegende Stenen)

La duoninsulo Kola estas la lando de la ŝtonoj, kiu estis prikantita de la akademiano A. Fersman tiel vaste, kun tia amo, ke ŝajnas, ke oni povas aldoni nenion plu. Sed tiu regiono estas tiel bela, ke ne paroli pri ĝi ne eblas.

Mi volas rakonti ne pri ercoj de altvaloraj metaloj, sed pri ŝtonoj, kiuj estas diŝjetitaj tra la tuta duoninsulo Kola kaj kuŝas tie antaŭ ĉies okuloj

Malgrandajn, mezgrandajn kaj enormajn rulŝtonoj – virŝafajn trunkojn – oni povas vidi en la tajgo sur la bordo de Terskij, en betularo apud Murmansk, en la montara tundro, sur la montetoj ĉe la bordo de la Glacia Oceano. Plej ofte aperas antaŭ la okuloj ŝtonoj kuŝantaj sur deklivoj kaj pintoj de montetoj. Ili ricevis apartan nomon : flugemaj ŝtonoj.

Tiun nomon elprenis el antikvaj legendoj kaj enirigis en la siencan lingvon la sovetia etnografo kaj esploristo de la nordaj popoloj, V. Ĉarnoluskij, aŭtoro de la libro « En la lando de la flugemaj ŝtonoj ».

Jen kion li rakontas : « La tutan tempon, dum kiu ni iris tra la tundro, ni renkontis ĉi tie kaj tie, fore kaj proksime rulŝtonojn kuŝantajn sur pintoj de montetoj... La grundo forte varmiĝis. Ekaperis miraĝo. Iutempe ĝi estis tiel forta, ke per travidebla strio ĝi apartigis la rulŝtonojn de



*Met de hartelijke groeten van
Kun la koraj salutoj de*

KBC-Bank Hechtel

Rode Kruisplein 5

B-3940 Hechtel

Tel. 011-73.02.20

Fax 011-73.02.21

hechtel@kbc.be

la tero. Ilia supra parto kvazaŭe pendis en la aero. Se la miraĝo estis tre forta, la rulŝtono ŝajnis tremeti. Ŝajnas, ke ĝi tuj deŝiriĝas de la tero kaj flugas super la tero tra la aero. »

Kaj eble la antikvaj Saamoj nomis siajn ŝtonojn flugemaj ankaŭ pro tio, ke ili rimarkis ion strangan. Ili ja vere konsistas el ercoj, kiuj klare distingiĝas de la indiĝenaj specoj. Kaj efektive ŝajnis ke, alfluginte de malproksime, ili eksidis tie por nelonga tempo, por poste denove forflugi tre malproksimen...

Ne estas mirinde, ke la antaŭuloj de la Saamoj, sentante la neordinarecon de la « flugemaj ŝtonoj » diigis ilin, faris el ili objektojn de adoro. Estiĝis la kulto de la ‘sejdoj’ – sanktaj ŝtonoj – en kiuj, laŭ la imago de la Saamoj, vivis la spiritoj kiuj regas la naturon. Ankaŭ la spiritoj mem nomiĝis sejdoj.

Iam V. Ĉarnoluskij petis iun el la lokaj loĝantoj akompani lin al unu el la sejdoj. Tiu diris al li, ke la spirito forlasis la sanktan ŝtonon, kaj klarigis kial : « Preter la sejdon pasas vojeto kunliganta la Sviatonan lumturon kun la tombejo de Iokango. En la lasta tempo la piedirantoj estis aparte oftaj... Ili vizitadis la Iokangan kooperativon, multe babilis kaj eĉ ridis. Al la sejdo tio ne plaĉis. » « Kien iris la sejdo ? » demandis la sciencisto, kaj la akompananto respondis : « Al vintra loko ĝi foriris, forflugis. Tion rakontis la maljunuloj. Nun estas malplene tie en la ŝtono. »

Kiel sanktaj ĉe la Saamoj estis konsiderataj ne ĉiuj, sed nur la plej rimarkindaj « flugemaj ŝtonoj », precipe tiuj, kiuj kuŝas sur izolitaj, sekretaj lokoj, fore de la grandaj vojoj.

En aparte gravaj, vivaj situacioj, ekzemple, dum la transkuro de la cervaroj al la someraj paŝtejoj printempe kaj ree al la arbaroj aŭtune, la Saamoj iris al la sejdoj, preĝis por bonsanĉo,

oferdonis kolorajn ĉifonetojn, tabakon, etajn monerojn, kapojn de salmoj.

La intuicio certe sugestis al la antikvaj homoj, ke tiuj rulŝtonoj estis neordinaraj. Hodiaŭ ni scias, ke ili vere ne ĉiam kuŝis sur siaj nunaj lokoj, sed « alflugis » de malproksime. Memkompreneble ne traere. Ilin portis grandegaj, kelkajn kilometrojn dikaj glaciejoj, kiuj en periodoj de grandaj glaciigoj kovris la tutan nordan de Eŭropo, kaŝante sub si mem ne nur malgrandajn montetojn, sed eĉ la Ĥibinajn kaj Lovozerajn montojn.

Malrapide fluanta giganta glacirivero tra-plugis la teron, deŝiris maldikan tavolon de la grundo, lozigis firmajn montojn ercojn, rompis de ili pecojn kaj gigantajn pecegojn. La glaciriveroj forportis tiun tutan ŝtonan materialon – morenojn – centojn kaj milojn da kilometroj malproksimen. Dum la longa vojaĝo la ŝtonaj pecegoj ruliĝis, rondiĝis, poiomete malleviĝis tra malaltajn tavolojn de glacio kaj sur la teron. Poste malvarmo ŝanĝiĝis je varmo, la glaciejoj retroiris, kaj grandnombraj grandaj kaj malgrandaj rulŝtonoj kovris la spacon, antaŭe kovritan per glacio. Kaj ju pli norden des pli multaj estas la rulŝtonoj, precipe la grandaj : ĉi tie la glaciejo restis dum pli longa tempo kaj sukcesis alporti pli multe da ŝtonoj, kaj grandaj rulŝtonoj malleviĝis malsupren pli rapide al tiuj malgrandaj.

La rulŝtonoj, alportitaj de glaciejoj, estas renkontataj ankaŭ pli sude – en Karelio, la Rusa ebenaĵo, sed tie ilia kvanto estas nekompareble pli malgranda, kaj ili estas ankaŭ pli malgrandaj kaj malpli rimarkindaj.

Ilia vera regno estas la nordo, Laponio, « la lando de la flugemaj ŝtonoj ».

*Aŭtoro: M. Zaferman, Murmansko
Trad. el la rusa : Olga Goriĉenko*

Historio de la Romia Imperio (1) *(Geschiedenis van het Romeinse Rijk) (1)*

1. La fondo de Romo (753 a.K.)

Laŭ la romia literatura tradicio ĉirkaŭ 1200 a.K. sur monteto sud-oriente de Romo estis fondita la urbo Alba Longa far Askanio, ankaŭ nomata Julo, la prapatro de la gento Julia, al kiu apartenis Julio Cezaro kaj Aŭgusto. Tiu Askanio estis la filo de Eneo (greke Ajneas), kiu, kun sia patro, sia filo kaj kelkaj amikoj fuĝis el la brulanta Trojo. Eneo estis laŭtradicie la filo de la deino Venuso. Cezaro kaj Aŭgusto povis do glori sin pri sia dia deveno ! Post longa surmara erarado Eneo alboriĝis en Latio (Latium), Italio, kie li devis batali kon-



La lupino de Romo (V-a jarcento a.K.). La ĝemeloj Romulo kaj Remo estis aldonita nur ĉirkaŭ 1500.

traŭ la lokan reĝon. Sed fine ili repaciĝis, kaj Eneo edziĝis al Lavinia, la filino de la reĝo.

Dum jarcentoj la posteuloj de Julo regis en Alba Longa. La dek-tria reĝo, Numitoro, estis detronigita de sia frato Amulio. Por sekurigi sian pozicion Amulio nomumis la filinon de Numitoro, Rea Silvia, kiel vestalo, t.e. sacerdotino de Vesta, la deino de la fajro. Vestaloj devis vivi en totala ĉasteco. Malobeo estis punita per mortigo. Gravedigita de Marso, dio de la milito, Rea Silvia naskis la ĝemelojn Romulo kaj Remo. Kiam Amulio aŭdis tion, li ordonis al sklavo ĵeti la ĝemelojn en Tiberon, sed tiu ĉi metis la infanojn en salikbrancetan korbon sur la riveron, esperante, ke oni trovos kaj savos ilin.

Kelkajn tagojn antaŭe la rivero estis transbordiĝinta. Kiam ĝi retiriĝis, la korbo kun la knaboj restis sur la bordo kaj estis trovita de lupino, kiu nutris ilin. La lupino kun la ĝemeloj restis la simbolo de Romo. Poste ili estis trovitaj de la paŝtisto Faŭstulo, kiu edukis ilin kiel siajn proprajn filojn, ĉar lia edzino kaj li ne havis infanojn. Ili fariĝis paŝtistoj.

Okaze de malpaco inter la paŝtistoj de Amulio kaj Numitoro Remo estis kaptita kaj kondukita antaŭ Numitoron. Remo rakontis al Numitoro, kiel li kaj lia ĝemela frato estis trovitaj de Faŭstulo apud Tiberon. Numitoro tuj komprenis, ke Remo estis lia nepo kaj venigis Romulon. Kune la viroj elpensis planon por forigi Amulion. Kun la helpo de aliaj loĝantoj de Alba Longa, la fratoj sukcesis mortigi Amulion kaj remeti sian avon sur la tronon.

Post tiuj eventoj Romulo kaj Remo deziris fondi sian propran urbon sur la loko, kie ili



Lukretia mortigas sin (laŭ Rembrandt)

estis trovitaj apud Tiberio. En 753 a.K. ili fondis Romon sur sep montetoj kiuj ĉirkaŭis marĉan ebenaĵon apud la rivero. Dum kverelo kun sia frato Romulo mortigis lin kaj fariĝis la sola reĝo de la nova urbo. Sed malmultis la enloĝantoj. Tial Romulo invitis ankaŭ krimulojn, kiuj vivis en apuda sankta arbaro. Ĉar estis granda manko je virinoj en Romo, li invitis la Sabenojn, loĝantojn de apuda urbo, al festo, dum kiu la Romanoj kidnapis la ĉestantajn Sabenajn virgulinon. En la milito, kiu sekvis, la Romanoj venkis la Sabenojn. Oni kredas, ke la unuaj loĝantoj de Romo estis miksaĵo de Latinoj, Sabenoj kaj Etruskoj.

Dum ĉ. 250 jaroj la urbo estis regata de reĝoj, entute sep, kvar el kiuj estis Etruskoj. La lasta reĝo, Tarkvinio Superbo, estis forpelita en 509 a.K. de Junio Bruto, kiu fondis la Roman respublikon. Fama estas en tiu rilato la sagao pri la perfortado de la Roma virino Lukretia far membro de la reĝa domo. Por forviŝi la honton ŝi mortigis sin.

La Romanoj forte adheris al siaj tradicioj kaj bazis sian kronologion sur tiu jaro 753. Ĉiu posta dato estis kalkulita ekde tiu jaro, kion ili indikis per la formulo *ab urbe condita* (ekde la fondo de la urbo). Arĥeologiaj esploroj konfirmis, ke la montetoj de Romo estis surloĝataj ekde tiu tempo aŭ iom pli frue. Poste ankaŭ la ebenaĵo inter la montetoj estis surloĝata, kaj estis tie konstruita la fama *Forum Romanum*, komence la vendoplaco de Romo kaj poste la socia kaj politika centro de la urbo.

La Romanoj estis ĉefe popolo de kampuloj-soldatoj. Ili devis preskaŭ daŭre militi. Ĉiuj Romanoj devis pagi siajn proprajn armilojn kaj ekipaĵon kaj soldati ĝis la 40-a jariĝo. La disciplino en la armeo estis tre severa. Ili ĉiam militis en batalordo adaptita al la cirkonstanco.

La respubliko estis regata de la senato kaj du konsuloj, kiuj regis la urbon dum nur unu jaro. Romo estis vera aristokratia ŝtato: la politika, ekonomia kaj socia potenco estis tute en la manoj de la aristokratoj, la *patricioj*. Sed iom post iom ilia potenco estis limigita de la *plebanoj* (la nearistokratoj). La opozicio inter la du klasoj en la daŭro elkrekis al vera klasbatalo. La senato, havante komence cent membroj, poste nombris tricent membrojn. La konsuloj havis la taskon elekti senatanojn inter la patricioj. Kiam la senato ne plu havis la devigajn tricent membrojn, ĝi allasis kelkajn plebanojn, kiuj, per la ekzerco de alta ofico, aristokratiĝis. En la plej danĝeraj situacioj de la ŝtato la senato montris grandan dignecon kaj amon de la patrio, kiuj vekas ĉies admiron.

En periodo de granda danĝero por la ŝtato, la senato elektis *diktatoron* por periodo de ses monatoj. Lia potenco estis senlima, tiel ke ĝi superis eĉ la potencon de la antaŭaj reĝoj.

La Roma popolo dividiĝis en kvar klasojn :
 1° La *patricioj* estis riĉaj, privilegiitaj Romaj civitanoj, posteuloj de la cent dekomencaj senatanoj. Patricioj estis nur la Romanoj kiuj naskiĝis en *gens* (gento), kiu estis tre malnova, riĉa aristokrata familio. Ili estis ĉiuj agrikulturistoj, kiuj ne rajtis komerci.

2° La *plebanoj* (de *plebs*, ordinara popolo) estis la grandega amaso de la nearistokratoj. Ili malhavis preskaŭ ĉiujn rajtojn, kaj la religio malpermesis geedziĝon inter la du klasoj.

3° La *liberigitaj* estis estintaj sklavoj, kiujn liberigis iliaj mastroj pro siaj bonaj servoj, aŭ estis *emancipitaj* de magistrato. Ili posteuloj pligrandigis la amason de la plebanoj.

4° La *sklavoj*, plej ofte militkaptitoj, kiujn la leĝoj ne agnoskis kiel personoj, estis konsiderataj kiel komercaĵoj, super kiuj ilia mastro posedis senliman posedrajton.

La Romanoj kiuj posedis ĉevalon, servis en la armeo kiel kavalerianoj. Jam baldaŭ tiuj ĉi konsistigis novan klason, tiun de la *kavaliroj*, kiuj ofte estis riĉaj komercistoj.

La riĉaj patricioj ĝenerale havis en sia servo nombron da liberaj personoj nomataj *klientoj*, kiuj akompanis sian protektanton (*patronus*), kiam tiu ĉi forlasis sian domon. Morale parolate, kliento estis subulo de sia protektanto, al

kies sorto la lia estis ligita. Li faris sian eblon por ĉiam plaĉi al li kaj voĉdonis por li.

La potenco de la ŝtato baziĝis sur la potenco de la patro, kiu disponis pri vivo kaj morto de siaj edzino, infanoj kaj sklavoj. La respekto de la leĝoj, la amo de la laboro kaj urbo kaj la civitana virto multe kontribuis al la gloro de Romo.

Ĉiuj civitanoj, kunvenintaj en la *Comitia Centuriata*, elektis ĉiujare la magistratojn kaj voĉdonis pri la leĝoj, proponitaj de la senato. En 286 a.K. tiu rajto transiris al al *Comitia Tributa*, en kiu la plebanoj havis la plimulton.

La Romanoj estis tre superstiĉaj kaj adoris multajn deojn kaj deinojn. Ili konsideris religiajn ceremoniojn kiel tre gravajn aferojn. Ili kredis, pro sia sukceso, ke Romo estis speciale protektata de la gedioj. La plej gravaj gedioj estis Jupitero, la ĉefdio, ties edzino Juno, Marso, Merkurio, la dia mesaĝisto, Diana, la diino de la ĉaso, kaj Minerva, la diino de la saĝeco.

(Laŭ diversaj fontoj, P.J.D.)

Aktivaĵoj de la Limburga Esperanto-Asocio

Pasintaj aktivaĵoj:

Ĵaŭdon 29.11.2012:

La juneco de D-ro L.L. Zamenhof: voĉlegado de Pieter Jan Doumen el la libro de Marjorie Boulton, "Zamenhof". Kvin ĉeestantoj sekvis la legadon kun multa intereso. Aperis, ke D-ro Zamenhof havis malfacilan junecon.

Ĵaŭdon 20.12.2012 :

Zamenhoffesteno okaze de la 153-a naskiĝdatreveno de D-ro L.L. Zamenhof en la restoracio 'De Boskop', Markt 1, Peer. Ses personoj partoprenis en ĝi.

La kasisto, Rik Leijskens, prezentis la kasraporton de la jaro, el kiu evidentiĝis pozitiva saldo. El sia propra poŝo li pagis la aperativon de la partoprenantoj.

Ĉiuj manĝis laŭ la menukarto.
Dum la manĝo oni agrable interparolis.

Estontaj aktivaĵoj :

Ĵaŭdon 31.01.2013 :

Rik Leijskens gvidos la kartludon 'Ĵokero'.

Ĵaŭdon 28.02.2013:

Henri Schutters gvidos la vortludon 'Serĉu la vorton'.

LINCOLN kaj KENNEDY

*La sorto fojfoje ludas strangan rolon,
kiel tion montras la respektivaj vivoj
de la famaj usonaj prezidentoj
Abraham Lincoln kaj John F. Kennedy.*

Estas sep literoj en ĉies nomo.
La laŭleĝeco de ilia elekto estis kontestata.
Ambaŭ zorgis pri la civitanaj rajtoj
de nigrahaŭtaj loĝantoj.
Ambaŭ estis murditaj iun vendredon.
en la ĉeesto de sia edzino.
Abraham Lincoln estis elektita en 1860.
John F. Kennedy estis elektita en 1960.
Ili sukcedintoj ambaŭ nomiĝis Johnson :
Andrew Johnson kaj Lyndon Johnson,
kiuj ambaŭ estis sudaj demokratoj
kaj membroj de la senato.
Andrew Johnson naskiĝis en 1808;
Lyndon Johnson naskiĝis en 1908.
La sekretario de Lincoln nomiĝis Kennedy,
kiu konsilis Lincoln ne iri al la teatro.
La sekretario de Kennedy nomiĝis Lincoln,
kiu konsilis Kennedy ne iri al Dallas.
Ili murdistoj nomiĝis John Wilkes Booth
kaj Lee Harvey Oswald.
En iliaj nomoj estas dek kvin literoj.
Ambaŭ estis suduloj kun radikalaj ideoj.
La korpoj de Lincoln kaj Kennedy estis
transportataj sur la sama afusto...

REMEMBRIĜO

Karaj geamikoj, se vi ankoraŭ ne renovigis vian membrecon ĉe FEL kaj/aŭ ĉe LEA, ni petas vin fari tion kiel eble plej baldaŭ.

Tiu membreco donas al vi la rajton partopreni en ĉiuj kunvenoj de la asocio kaj vi ricevos la revuon HORIZON-TAAL.

Por via remembrisigo ĉe FEL ni petas vin plenigi la formularon, kiun vi ricevis kune kun la revuo. Bonvolu plenigi kaj sendi ĝin al FEL.

La kotizo por la membreco de FEL estas € 25 por la tuta jaro.

Per la membrisigo ĉe FEL vi estos aŭtomate ankaŭ membro de LEA.

Se vi ne deziras membrisigi ĉe FEL, sed jes fariĝi membro de LEA, bonvolu ĝiri € 12,50 al la konto de LEA ĉe la KBC 735-0190144-12.

La revuo La Ponto vi ricevos senpage.

Ni tutkore dankas vin pro via subteno kaj esperas revidi vin dum niaj kunvenoj !

Enhavo de tiu ĉi numero de ‘La Ponto’:

- Paĝo 2: Kolofono
Redaktore...
Plua historio de Esperanto (2) (*Støp-Bowitz kaj Isbrücker*)
- Paĝo 4: Novaĵoj el Esperantolando:
- Francio: Martorelli ricevis la premion FAME (*Ret-Info, Eventoj, Hungario*)
- Pollando : Ponto Esperanto en Bydgoszcz (*Ret-Info, Eventoj, Hungario*)
- Belgio: Alvoko al la legantoj de La Ponto (*Eriko D’Hond, Belgio*)
- Paĝo 5: - Nederlando: Poŝtmarko pri la Unua Libro (*Ret-Info, Eventoj, Hungario*)
- Argentino: Ĉiutagaj novaĵoj mallonge (*Ret-Info, Eventoj, Hungario*)
- Hungario: Avo Frostro parolas Esperanton (*Ret-Info, Eventoj, Hungario*)
- Paĝo 6: Recenzo : Karlo kaj Elegasto (*Marulino Hemelaar*)
- Paĝo 8: Historio de la Romia imperio (*Pieter Jan Doumen*)
- Paĝo 10: Aktivaĵoj de la Limburga Esperanto-Asocio.
Lincoln kaj Kennedy
Remembrigō

Lernu Esperanton!

Kiom da fojoj ni ne staras en fremda lando kun frostinta lan-go, ne kapablaj paroli la lin-gvon de la tieaj homoj?
La mondo bezonas superna-cian, duan lingvon.
Sola Esperanto ofertas vere demokratan solvon por tiu problemo, ĉar per ĝia ekonomia kaj politika neŭtraleco ĝi metas ĉiujn homojn sur egalan nive-lon. Ĝi estas ne nur la plej facila lingvo en la mondo kaj la sola, kiu estas tute regula – ĝia gra-matiko ne havas esceptojn –, sed ĝi pledas ankaŭ por egalaj rajtoj por ĉiuj popoloj.
“Kiom da lingvoj oni parolas, tiom da fojoj oni estas homo”, diris imperiestro Karlo V.
Tamen homo bezonas, ekster sia dialekto, nur du lingvojn: sian nacian lingvon kaj Esperanton.
Esperanto ne volas anstataŭigi la naciajn lingvojn, kiel pensas multaj homoj, sed jes servi kiel komunikilo inter homoj, kiuj ne havas la saman gepatran lingvon.

Leer Esperanto!

Hoe vaak staan wij niet in een vreemd land met de mond vol tanden, niet in staat de taal te spreken van de mensen aldaar?
De wereld heeft een supranationale, tweede taal nodig.
Alleen Esperanto biedt een echt democratische oplossing voor dat probleem, want door zijn economische en politieke neutraliteit plaatst het alle mensen op gelijke voet. Het is niet alleen de eenvoudigste taal ter wereld en de enige die volledig regelmatig is – haar grammati-ca heeft geen uitzonderingen –, maar zij pleit ook voor gelijke rechten voor alle volkeren.
“Zoveel talen als men spreekt, zo vaak is men mens,” zei keizer Karel V.
Nochtans heeft een mens behalve zijn dialect maar twee talen nodig: zijn nationale taal en Esperanto.
Esperanto wil niet de nationale talen vervangen, zoals sommi-gen denken, maar wel dienen als communicatiemiddel tussen mensen die niet dezelfde moedertaal hebben.

Apprends l’Espéranto!

Combien de fois ne restons-nous pas bouche bée dans un pays étranger, incapables de parler la langue des indigènes ? Le monde a besoin d’une langue supranationale. Seul l’Espéranto offre une solution vraiment démocratique à ce problème, car, par sa neutralité économique et politique, il met tous les hommes sur un pied d’égalité. Ce n’est pas que la langue la plus simple au monde et la seule qui soit tout à fait régulière – sa grammaire n’a pas d’exceptions –, mais il plaide aussi pour des droits égaux pour tous les peuples.
"Autant de langues on parle, autant de fois on est homme," a dit l’empereur Charles-Quint.
Pourtant un homme n’a besoin, hors de son dialecte, que de deux langues: sa langue nationale et l’Espéranto, qui ne veut pas remplacer les langues nationales, comme pensent certains, mais servir de moyen de communication entre les gens qui n’ont pas la même langue maternelle.